

Esperantisto Slovaka

Gazeto de la Slovacia Esperanta Federacio.
Fondita en 1946 de Ernesto Váňa.

2/2019

ISSN 1335 5031



Enhavo

Vierka Zvarová	3
SES kaj SEP - du ebloj pasigi utile kaj amuze someran semajnon	5
IJK 2019 - la LKK denove kunsidis	6
Ján Maliarik	8
Tutslovakia Esperanto-Kongreso	9
TEK 2019 per la okuloj de nia nova kasistino	11
Esperanto-sumoo	12
Polyglot Gathering 2019 – la plej granda kaj riĉenhava Esperanta renkontiĝo sur Ĉantoryja en 2019	16
Igor Chýra	18
Rana koncerto	19
El la vivo de LEK-anoj	19
Humura angulo	21
La 71-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso	22

Frontpaĝe: *Granda vortaro slovakia-Esperanta en la manoj de lia verkinto, samideano Július Hauser. Apude staras samideano Jozef Reinvert.*

Por la
tria numero de nia bulteno
bonvolu sendadi la artikolojn ĝis la 15-a de septembro 2019.



Gazeto de la Slovakia Esperanta Federacio.
Fondita en 1946 de Ernesto Váňa.
Aperas 4-foje jare.

Esperantisto Slovaka

N-ro 2/2019 ISSN 1335-5031

*Ĉasopis Slovenskej esperantskej federácie.
Založený v roku 1946 Ernestom Váňom.
Vychádza 4x do roka.*

Respondeca redaktoro

zodpovedný redaktor:

Pavol Petřík, pavol907@gmail.com

Plenuma redaktoro kaj teknika prilaborado

výkonný redaktor a technické spracovanie:

Magdaléna Feifíčová

Membrokito por SKEF:

libervola, sed **minimume 10 EUR**

(inkluzivas la elektronikan version de ES).

Abonkito por la elektronika versio de ES

(sen membreco en SKEF): min. 4 €.

Validas kaj por eksterlandanoj, kaj por slovakoj.

En ambaŭ kazoj uzu

la **kontonumeron de SKEF** en FIO-Banko:

IBAN: SK72 8330 0000 0026 0082 0124,

SWIFT/BIC: FIOZSKBAXXX.

Krom tio eblas pagi al nia **UEA-konto**: skef-i.

Atentigo: nepre sciigu vian retadreson kaj vian pagon anoncu al nia kasisto (*vidu sube*).

Ĉlenské pre SKEF:

dobrovoľné, avšak **minimálne 10 EUR**

(zahrňa elektronickú verziu ES).

Predplatné za elektronickú verziu ES

(bez členstva v SKEF): min. 4 €.

Platí pre cudzincov aj pre Slovákov.

V oboch prípadoch použite

číslo účtu SKEF vo FIObanke:

IBAN: SK72 8330 0000 0026 0082 0124,

SWIFT/BIC: FIOZSKBAXXX.

Okrem toho možno platiť aj na naše

UEA-konto: skef-i.

Upozornenie: nevyhnutne uveďte svoju

mailovú adresu a platbu oznámte našej

pokladničke (*pozri dole*).

Adreso de la Slovakia Esperanta Federacio

Adresa Slovenskej esperantskej federácie:

Februárová 2

SK-985 01 Partizánske, Slovakia

Prezidanto / *predseda:*

Peter Baláž, peter.balaz@esperanto.sk

Kasisto / *pokladník:*

Mária Pilková, maria.pilkova@seznam.cz

VIERKA ZVAROVÁ

Komence de julio 2019 Vierka Zvarová ĝisvivis belan vivjubileon. Ŝi estis konata kiel bona esperantistino kaj instruistino de Esperanto por infanoj. Kadre de interŝanĝaj infanaj tendaroj ŝi vizitis urbojn Eger (HU) kaj Stralsund (DE). Lastajn jarojn ŝi jam ne estas aktiva en Esperanto-movado.



Omaĝe de ŝia vivjubileo ni donis al ŝi kelkajn demandojn:

Kiel vi festis vian jubilean naskiĝtagon?

Mia jubilea naskiĝtago estis sufiĉe interesa. De miaj infanoj mi ricevis Kristnaskan donacon -

flugbileton kaj restadon en Bruselo, kie mi vizitis ĉiujn vidindaĵojn.

Via poresperanta vivo komenciĝis en la urbo Nitra kaj en la banloko Dudince. Kiuj estis viaj unuaj instruistoj kaj kiel vi memoras pri viaj unuaj Esperantaj geamikoj?

Miajn unuajn informojn kaj kontaktojn kun Esperanto mi ricevis en la jaro 1971, kiam mi finstudis Pedagogan fakultaton en Nitra. Antaŭ mi estis 3-monataj ferioj kaj mi nenion planis por pleniĝi ilin. Unu tagon vizitis min amikino kun anonco, ke en Dudince okazos somere Esperanto-lernejo. Do, ni aliĝis kaj poste partoprenis ĝin. Ni vizitadis kurson A por komencantoj, kiun gvidis Tibor Gál. Nia „klaso“ estis en naturo - en futbalstadiono. Ĉiutage vizitadis nian instruadon s-ano Arnošt Váňa, fama esperantisto, kiu konatigis nin kun historio, progreso kaj sukceso de Esperanto en Slovakio kaj mondo. Dum tagmanĝo kaj poste en banejo kaj dum vespera kantado ni ekkonis aliajn partoprenantojn de kurso B, C, D kun iliaj instruistoj: Teodor Andreas, Milan Zvara kaj bulgaro Ĥesapĉiev. Dum restado estis ege

amika kaj gaja etoso kaj ni ĉiuj travivis belegajn feriojn. Plimulto da ni vizitis SELD-on aŭ SELKO-n dum pluaj jaroj. Kun Milan Zvara mi konatiĝis pli detale dum somero 1972 kaj ekde tiu tempo ni estis kune.

Via unua Universala Kongreso estis Ateno en la jaro 1976. Por slovakaj Esperanto-movado la kongreso estis grava, ĉar dum la kongreso Asocio de Esperantistoj de SSR (AE SSR) estis akceptita kiel membro de UEA. Ĉu vi povas priskribi, kiel okazis la solena akto de akceptado?

Akcepto de AE SSR kiel membro de UEA estis solena por la tuta grupo de slovakaj esperantistoj en Ateno. Ĉefe momento dum deklaro en granda salono, kiu prononcis s-ano Ivo Lapena kiel prezidanto de UEA. Sed pli multe mi memoras neoficialajn diskutojn kaj gratulojn kun nia asocia prezidanto s-ro Pavlo Rosa kaj multaj eksterlandaj funkciuloj de aliaj asocioj.

Kia estas via opinio pri nuntempa Eo-movado? Kiaj estas la plej gravaj diferencoj inter la movado antaŭ 30 jaroj kaj nun?

Ĉefa tasko de Esperanto ekde ĝia naskiĝo estis interkompreniĝo inter diversaj nacioj. Tiamaniere komprenis la situacion ankaŭ nia

generacio: kontaktojn, diskutojn, renkontiĝojn kun eksterlandanoj. Interkompreniĝi per Eesperanto estis alloga, sed multfoje unufoja eblo havi kontaktojn kun eksterlando. La duan sencon de Esperanto ni malkovris pli malfrue, post la longdaŭraj kontaktoj kun esperantistoj - tiel nomatan internan ideon. Hodiaŭ, kiam la angla lingvo malantaŭenigis Esperanton, mi vidas tiun taskon kiel la plej ĉefan.

Siatempe la familio Zvara estis la plej konata Esperanta familio en Slovakio? Ĉu iu el familianoj nuntempe agadas en la movado aŭ uzas Esperanton?

Esperanta vivo en Poprad estis en pasinteco tre vigla, ĉefe laŭ merito de Milan Zvara kaj Milan Neubeler, kiuj regis la lingvon. Nian hejmon vizitadis multaj slovakaj kaj eksterlandaj Esperantistoj, do oni povas diri, ke „hotelo Zvara“ estis vaste konata. El kvar infanoj de Milan nur du parolas Esperante, sed hodiaŭ neniu el familio agadas en la movado. Mi persone uzas la lingvon nur dum raraj vizitoj de „malnovaj“ amikoj aŭ ĉe legado de E-libroj aŭ gazetoj.

Mi dankas al Vierka kaj deziras al ŝi kaj al ŝia familio feliĉan vivon.

J. V.

SES KAJ SEP - DU EBLOJ PASIGI UTILE KAJ AMUZE SOMERAN SEMAJNON

Jam tre baldaŭ - inter 12-a kaj 20-a de julio 2019 okazos samloke en Nitra, Slovakio du partoprenindaj eventoj: la jam tre konata kaj eblas diri tradicia SES (Somera Esperanto-Studado) kaj tute nova kaj samtempe noviga aranĝo SEP (Somera Esperanto-Programado).



Prezenti SES verŝajne al la legantoj eĉ ne bezonatas - pri la evento oni jam bunte informas ĉiujare. Se hazarde iu ne konus la tutmonde plej grandan someran Esperanto-lernejon, tiu nepre vizitu la ĉefpaĝon: <https://ses.ikso.net> por konatiĝi kun la detaloj (eventuale rekte aliĝi).

Ĉi-foje ni prefere prezentos la novigan kaj unikan aranĝon, kiu entute la unuan fojon okazos en Esperantujo –SEP! La unuan fojon en la historio de Esperantujo ni invitas vin al SEP, la unua Esperanta hackthon! Kio estas hackathon (Esperante kodummaratono)? „Hackathon“, kiun oni ankaŭ foje nomas kodumtago, kodumfesto aŭ kodfesto, estas fasona sprinteevento, dum kiu programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, interfacfasonistoj,

projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboras pri komputilaj projektoj. La celo de kodummaratono estas krei funkciantan programaron aŭ aparataron fine de la evento. Kodummaratonoj kutimas havi specifan temon, kiu povas esti programlingvo, aplikaĵo, API. Foje limigoj entute ne estas. Fine de la evento oni prezentas sian projekton.

SEP (SOMERA ESPERANTO- PROGRAMADO)



La unua ideo pri SEP venis de Georg Jähnig el Berlino, kiu proponis la ideon de kodummaratona okazaĵo dum SES

ĉi-jare de la 12-a ĝis 20-a de julio 2019 en Nitra (Slovakio). Ĉar programistoj ne mankas en Esperantujo, ŝajnis strange al ni, ke ĝis nun ankoraŭ neniu tia evento okazis, kaj pro tio ni decidis organizi SEP-on. Dum sep tagoj ni programos, grafikumos kaj fasonos ĉiumatene. Oni povas veni kaj krei propran projekton, teamiĝi kaj eĉ estos projektoj proponitaj de ni, kiuj estas elpensitaj tiel, ke ili helpu Esperantujon.

- 7 tagoj
- unu temo
- programistoj, grafikistoj kaj profesiuloj de la tuta mondo
- matena programado
- venu kun propra projekto aŭ laboru pri iu proponita

Organizantoj de SEP: E@I

Partneroj de SEP: UEA kaj ESF

Do jen, ĉu lerni Esperanton dum SES aŭ veni programi/grafikumi por Esperantujo - ambaŭ aferoj samloke fareblas en Slovakio ĉi-somere!

Peter Baláz

IJK 2019 - LA LKK DENOVE KUNSIDIS

Post finkonfirmi ĉion gravan kun la studenthejmoj kaj lernejoj, klaraj imagoj pri la prelegĉambroj kaj koncertaj salonoj, duonpreta menuo, ekskursoj planitaj kaj pli ol 200 aliĝintoj preskaŭ tri monatojn antaŭ la komenco de la IJK 2019, la pretiglaboroj venas al siaj lastaj paŝoj.

Kvar tagojn kunsidis la LKK de la IJK 2019 en la ĉarmega urbeto Liptovský Hrádok (Slovakio). Ni preparolis la programon kaj ĝian strukturon, kion la partoprenontoj manĝos, kion ili ricevos en la kongresaj sakoĵoj, ni parolis ankaŭ pri bonveniga servo en la trajnstacioj de Liptovský Mikuláš kaj Hrádok, diversaj administraĵoj,

informiloj kaj memkompreneble kiom ni antaŭgojas gastigi tiom multe da junaj esperantistoj en unu el la plej vizitataj regionoj de Slovakio.



La organizantoj kaj helpantoj ĉe unu tablo.

Fotis: Eugénia Belková

Krom sidi kaj kunsidi ni ankaŭ ekskursis en la ĉirkaŭaĵo kaj kelkaj

el la organizantoj kaj helpantoj testis la pretigitan urban ludon, por ke ĝi perfektu por la kongreso mem (kaj por ekkoni la urbon).



Knabinoj testis la urban ludon.

Fotis: Eugénia Belková

Paulína, Žeňa, Tomáš kaj mi estis akceptitaj ĉe la urbestro de Liptovský Mikuláš, kie ni planas okazigi la Kultur-Lingvan Festivalon. La urbestro ne nur ĝoje akceptis nin, sed aldone proponis al ni disponigi kelkajn muzeojn senpage, aldoni Esperanton kiel lingvon al la ĉiĉerona apo kaj donis al ni kontakton al homoj, kiuj helpas nin kun merkatiĝo.



Kun urbestro de Liptovský Mikuláš.

Fotis: Eugénia Belková

Menciindas, ke ni ankaŭ detale planis programon por la tago de malfermitaj pordoj, kiam la kongreso estos malfermita al vasta

publiko. Ekzemple, en la loka kultura domo estos malfermita ekspozicio pri Esperanto kaj ankaŭ vi povos esti parto de ĝi.



Placo, kie okazos la Kultur-Lingva Festivalo. Fotis: Eugénia Belková

Estis denove tre fruktodona, jam tria oficiala LKK-kunsido kaj mi aparte dankas al ĉiuj teamanoj, nome Žeňa, Tomáš, Manuela, Vít, Paulína, Veronika, Baptiste, mia ĉarmega patrino Jana kaj Matthieu por esti nekredeble bonaj teamanoj kaj laboremuloj.



Ankaŭ la plej grava morala subtenanto partoprenis la LKK-kunsidon. Fotis: Eugénia Belková



*Léon Kamenický
la 15-an de majo 2019*

NIAJ ANTAŬULOJ

JÁN MALIARIK (8. 11. 1869 - 14. 7. 1946)

Profesie li estis evangelia pastro en Veľké Leváre. Li konis dekdu lingvojn, inkluzive de Esperanto. Maliarik kredis je la unueco de ĉiuj religioj kaj studadis

ĉiujn. Ekde la jaro 1908 ĝis la jaro 1912 li prelegis en diversaj filozofiaj-religiaj socioj en



Vieno, Prago, Brno, Budapeŝto. La Evangelia eklezio emeritigis lin antaŭtempe en la jaro 1914. En februaro 1916 li deklaris dum la paŭzo de la opero Valkyra de Wagner ĉe la Nacia Teatro de Prago, la proklamon „Laŭ Nomo de la dia volo“ kun la postulo por haltigi la militon kaj establi mondan pacon. Poste li estis kondamnita al morto pro perfido. Amikoj savis lin, sed li estis metita en frenezulejon ĝis la fino de la milito. Eĉ post la establado de Ĉeĥoslovakio li ne estis rehabilitita. Senlace li verkis librojn kaj korespondis

kun regantoj por konservi la pacon. Li volis averti kontraŭ la dua mondmilito kaj li postulis Hitleron al la intelekta duelo inter Slavoj kaj Anglosaksoj

Li diris: „Ni devas batali ĉi tie kun du grandaj malfacilaĵoj. Unu granda malfacilaĵo estas, ke historie konataj gvidaj centroj estas aŭ forte subigitaj de eraro (ili estas limigitaj de miopaj fanatikuloj), aŭ ili estas rekte mistifikantoj. La dua granda malfacilaĵo estas, ke la amasoj estas neevoluintaj, senkonsciaj, limigitaj, blindaj kaj malnoblaj. La pli gravega demando: Kiun endas kulpigi kaj plendi: falsajn, malbonajn gvidantojn aŭ senkonsciajn homajn amasojn? Mia respondo estas mallonga, sed certe: Falsajn, malbonajn centrojn, kiuj ekregis la amasojn! Kiel la amasoj estas gvidataj, tiaj ili estas! Se la amasoj estas malbonaj, gvidantoj-edukistoj estas la kulpuloj! Tial ni devas pardoni la amasojn! Sed ni ne povas pardoni malbonajn gvidajn centrojn!”

Mária Václavjaková

TUTSLOVAKIA ESPERANTO-KONGRESO



TEK

TEK okazas ĉiun trian jaron (kiam temas pri la balota jaro, intertempe okazadas ne kongreso, sed renkontiĝo (TER). Krom la „kutima“ programo de prelegoj, diskutoj kaj ekskursoj ne mankis do ĉi-foje ankaŭ la jarraportoj de unuopaj E-klubo kaj organizoj en Slovakio kaj sekve balotoj por la nova estraro de SKEF. TEK ĉi-jare estis dediĉita interalie al diversaj kontribuoj de Esperanto, nemateria kultura heredaĵo, kaj memkompreneble al la unua slovaka IJK kaj ĝiaj eblaj kontribuoj al liptova regiono. Tial do eblis ekkoni la planojn de la agado de SKEF kaj SKEJ,

partopreni en diskutoj, proponi novajn agadojn, mem kontribui kaj ankaŭ partopreni la ceteron de la amuza programo!

PRI LA URBO

La urbo Liptovský Hrádok estas urbeto, kiu troviĝas inter du famaj montaroj en norda Slovakio - inter Altaj kaj Malaltaj Tatroj - kaj ĉe la krucvojo de du riveroj –Váh kaj Belá. En la urbo loĝas pli-malpli 7000 loĝantoj, do ni havas ŝancon videbligi Esperanton en tiel malgranda urbo. La urbeto mem ekzistas jam pli ol 700 jarojn kaj estas ĉirkaŭita de ĉefe unikaj, diversaj kaj turisme allogaj

atrakcioj kaj vidindaĵoj. Inter ili estas troveblaj:

- naciaj kulturaj monumentoj - mezepoka kastelo, preĝejoj, sonorilejo, konstruaĵo de antaŭa Sala kaj kupra oficejo;
- restaĵoj de juda tombejo kaj unikaj konstruaĵoj, kiuj estis konstruitaj pere de specifa tehniko de Liptovaj muristoj;
- la plej alte funkcia arboreto en meza Eŭropo; tilia aleo, en kiu estas arboj pli ol 200-jaraĝaj.

PROGRAMO

Dum la evento okazis prelegoj, diskutoj, raportoj pri agado, kunsidoj de laborgrupoj kaj lokaj organizoj, sed ankaŭ konkurso, kvizo, medogustumado, projekciado de filmo, kaj vizito de la urbo kun urba ludo. Ne mankis ekzemple eĉ libervole elektebla „flosado“ tra la apuda rivereto sur la gumaj flosoj. Elinter la prelega parto de la evento jam vendrede estis ja pluraj tre interesaj: ekz. tiu de la hungara s-ano Imre Keményfi: „Samaj, similaj kaj konfuzaj vortoj inter la slovaka kaj hungara lingvoj“, de la ĉeĥa aktivulo Petr Chrdle: „Pri la japana bohemisto Kurisu Kei“ aŭ du prezentoj de la loka liptova E-isto-vojaĝanto Ján Vajs: „Esperanto-sumoo“ kaj „Liptovaj Esperanto-gravuloj“. Prelego de Jozef Reinart ankaŭ traktis la ĉeftemon de la aranĝo: „Vademecum de multdisciplina

projekto „Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo (MIME)“. Vespere okazis prezento de la freŝaj eldonaĵoj de la eldonejoj Espero (de Slovakio) kaj KAVA-PECH (de Ĉeĥio). Sabate la programo komenciĝis pere de la prezento de lokaj eo-klubo kaj organizoj. Sekvis prezento de la SKEF-prezidanto Peter Baláž pri provo enskribi nian lingvon al nacia Unesko-komisiono sub la titolo: „Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo de Slovakio“. La proceduro sukcese estis sendita al la decida instanco, nun necesos atendi ĝis la jarfino por la rezulto. Dum la tuta evento funkciis riĉa libroservo (de la eldonejo Espero) kaj okazis konkurso pri la nova ludo de E@I „Vortoj“ (pli pri ĝi en www.vortoj.net/eo)

ELEKTOJ

Sekva programero sabate estis la balotoj por SKEF - por la posteno de prezidanto ne estis aliaj kandidatoj ol la ĝisnuna: Peter Baláž. Sekve la nove elektita estraro aspektas jene:

- Peter Baláž - prezidanto
- Jozef Reinart - vicprezidanto
- Mária Pilková - kasisto
- Eva Poláková - monpetoj/scienco
- Pavol Petrik - ES-redaktoro
- Magdaléna Feifíčov - revizoro

La reelektita prezidanto skize prezentis sian imagon pri la

farendaĵoj kaj ankaŭ pri la plibonigindaĵoj. Elinter la planoj estas tiuj por la rekonstruo de la retejo www.esperanto.sk, kreo de novaj, rete uzablaj informiloj, ordigo de la administrado de la organizo kaj membroj, tutjara kurso de EO por la porinfana monata gazeto Maxík kaj solvo de la situacio ĉirkaŭ la slovaka E-arkivo kaj biblioteko. SKEF ankaŭ volas kontribui al la aranĝoj, planataj en proksima tempo en Slovakio: elinter ili LingvaFest', SES, TER, KAEST 2020, Zamenhof-festoj... Entute 35 homoj el ses landoj

partoprenis la aranĝon - certe ne multe - sed konsiderante la (mal)grandecon de la lando, la kvanto estas ja komparebla kun tiu de grandaj landoj kun eĉ multe pli forta movado. (Des pli, se oni aldone imagas, ke okazas tiom da diversaj EO-eventoj en Slovakio - eĉ signife pli grandaj kaj internaciaj - kiel ekz. SES, KAEST, (IJK ĉijare) ktp. Sume do temis pri tre utila, inspira kaj ĉarma aranĝo - ni esperu, ke ĝi jam baldaŭ portos siajn fruktojn!

Peter Baláž, SKEF-prezidanto

TEK 2019

PER LA OKULOJ DE NIA NOVA KASISTINO

Liptova-regiono estis grava centro de nia movado en la nuntempo. Pasintjare okazis sukcesa Somera Esperanto-Studado en Liptovský Mikulaš. Ĉijare ekde la 9-a ĝis la 12-a de majo okazis Tutslovakia Esperanto-Kongreso en Liptovský Hrádok kaj junaj esperantistoj el la tuta mondo renkontiĝos en la urbo somere.

La ĉefa temo de TEK estis „Esperanto - subtenanto de multlingvismo kaj lingvo-protektanto“. La tritaga programo estis riĉa kaj interesa. El programo mi mencias la prelegojn de la prezidanto de EEU, irlanda diplomato Seán Ó Riain, nuntempe aganta en Vieno. Li parolis pri la

danĝero de la superregado de la angla lingvo por aliaj lingvoj sur la ekzemplo de la irlanda kaj kimra lingvoj. Grava estis prelego de Jozef Reinvart pri la propono de envicigo de „La lingvo Esperanto kiel portanto de slovaka kaj Esperanta kulturo“ en la liston de nemateria kultura heredaĵo de UNESKO en Slovakio. Interese prelegis Ján Vajs pri esperantistoj el Liptova-regiono. Lia prelego konfirmis, ke slovakoj sukcesis kaj disvastigas Esperanton pli ol cent jarojn. Alia elstara programero estis prezento de Granda vortaro slovaka-Esperanta fare de ĝia aŭtoro Július Hauser. Ĉeĥa samideano Petr Chrdle alloge prelegis pri japana esperantisto

Kurisu Kei. Fine estis elektita nova komitato de SKEF.

Agrabla vetero ebligis fari promenadojn, sportojn kaj ludojn en la bela subtatra urbo. Junuloj faris flosadon sur la trankvila rivero Váh. Kelkaj el ni decidis viziti tombejon de A. Ŝkarvan. Ĉiam kompleza J. Vajs montris al nia grupo lian tombon. Poste ni vizitis ankoraŭ malgrandan kastelon aŭskultante prelegon pri ĝi kaj ĝia

kaverno. Ni supreniris sur pinteton Skalka, vidante tutan urbon kiel sur la polmo. Domaĝe, ke ne partoprenis pli da slovakaj esperantistoj, por ke ili parolu pri nuntempo kaj estonteco de nia movado. Ĉiukaze ni pasigis en Liptovský Hrádok belajn printempajn tagojn. Dankon al ĉiuj organizantoj kaj prelegantoj.

M. Pilková

ESPERANTO-SUMOO



Ĉi-jare, dum Tutslovaka Esperanta Kongreso, sekretario de LEK J. Vajs prelegis pri internacia konkurso Esperanto-Sumoo.

Sumoo estas japana tradicia lukto, kiu inspiris pedagogon Hori Jasuo. En septembro 2009 li iniciatis por japanaj samideanoj konkurson en legado de libroj nomita Eo-Sumoo. Tuj en marto 2010 li disvastigis ĝin internacie. Ĉiun jaron okazas ses konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭras dek kvin tagojn.

Ĉefaj reguloj estas:

1. aliĝi al Eo-Sumoo;

2. decidi kaj publikigi, kiun libron kaj kiujn paĝojn tage vi legos;
3. ĉiujn kvin tagojn sendi vian rezulton;
4. kiam vi legas pli ol la promesitan kvanton, vi akiras venkon markitan per „0“ alie vi anoncos al Hori signon „X“;
5. Hori preparos internaciajn rezultojn laŭ landoj.



Hori Jasuo

Luktistoj legintaj perfekte dek kvin venkojn en la antaŭa sumoo, apartenas al rango A. Luktistoj, kiuj ne venkis perfekte, apartenas al rango B, kaj novaj partoprenantoj

apartenas al rango C. La partoprenantoj luktadas dek kvin tagojn ne kontraŭ aliaj partoprenantoj, sed kontraŭ sia maldiligenteco. Slovakaj esperantistoj aŭskultis pri E-Sumoo unuafoje dum la renkontiĝo de Esperantaj-vojaĝantoj sub Poludnica en la jaro 2017. Tiam la prezidanto de Pola Esperanto Asocio (PEA) Aleksander Zdechlik ĝin prezentis. Tiam nur du slovakoj aliĝis al tutmonda luktado, mi kaj J. Vajs. Post legado, multaj homoj verkas recenzojn, kiuj aperas en retejo. Mi komencis legi kaj traduki Historion de la Esperanta movado skribita per P. Rosa, poste legante broŝurojn de J. Vajs Ultima Thule kaj Kongresa taglibro, poezion de V. Ludikova kaj J. Liekert, libron skribitan per H. Fidelalao el Madagaskaro Heroo de la ĉiutagaĵo.

Nuntempe mi legas Slovakian antologion, la plej faman kaj nemorteman verkon de niaj Esperantaj antaŭuloj, pri kiu mi skribis recenzon Esperante kaj slovake. Mi povas diri, ke ne estas facile legi regule ĉiun tagon, tio estas demando de memdisciplino. De alia flanko la legado al mi helpis forgesi malfacilaĵojn de la vivo. Admirinda estas, ke J. Vajs kaj A. Zdechlik legis regule ankaŭ dum sia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo!

Raporton pri liaj spertoj oni povas legi sur la paĝo <http://www.esperanto-sumoo.pl/>. Dum Universalaj kongresoj esperantistoj sumo-istoj renkontiĝadas kaj diskutas pri siaj spertoj.



*Dum TER 2019
pri la Esperanto-sumoo prelegis
la sekretario de LEK Ján Vajs*

La lasta E-sumoo okazis en majo 2019, partoprenis ĝin 298 esperantistoj el 35 landoj. Ŝajnas, ke Esperanto-Sumoo estas la plej granda tutmonda legmovado. Regula legado kondukas homon al kohereco kaj respondeco. E-sumoo helpas konservi kaj pligrandigi lingvajn kapablojn. Dum socialismo estis simila agado en nia teritorio. Junuloj, kiuj regule legadis librojn, ricevis en Ĉeĥio insignon nomitan J. Fučík (ĵurnalista) kaj en Slovakio insignon nomitan P. Jilemnický (verkisto).

Mária Václavjaková

POLYGLOT GATHERING 2019 - LA PLEJ GRANDA KAJ RIĈENHAVA

La renkontiĝo Polyglot Gathering (Plurlingvula Kunveno) allogis fine de majo al Bratislavo rekordan kvanton de plurlingvemuloj. Entute partoprenis ĝin 654 personoj el 67 landoj.

Jam la sesan fojon okazis ĉi tiu evento, kaj, kio estas ĝojiga, ĉiujare ĝi allogas pli kaj pli da homoj (ĉi-jare venis je 116 homoj pli multe ol pasintjare).



Poliglotoj (plurlingvemuloj) evidente komencas malkovri sin kiel komunumon, intereso-grupon, movadon. Eĉ sen firmaj movadaj kaj organizaj strukturoj sentblas la emo renkontiĝadi kaj fari ion „utilan“ kaj interesan por si mem kaj por aliaj poliglotoj. Tiel ja naskiĝis la Plurlingvula Kunveno, kiun efektive fondis tri esperantistoj kaj aliaj esperantistoj (ene de E@I) plu organizas ĝin.

Oni ne ŝokiĝu (estante ĝisosta esperantisto): la ĉefa komuniklingvo estas la angla! Sed... ĝi estas tie pro praktikaj kialoj - plej multaj poliglotoj nuntempe ja regas ĝin. Do por doni la gravajn anoncojn, aranĝi pagojn, sciigi pri manĝoj, programo, ekskursoj ktp oni uzas la anglan. Sed krome - ĉiuj poliglotoj venas al

la renkontiĝo ĝuste por praktiki aliajn lingvojn!

Ofte ili venas, ĉar ĉi tie ili trovas rarajn eblojn:

- a) renkonti „plurlingvemajn samideanojn“, kiuj samkiel ili ŝatas lerni diversajn (jes ja, eĉ tre ekzotikajn) lingvojn;
- b) aŭskulti prelegojn pri lingvorilataj temoj (ofte de famaj kaj prestiĝaj poliglotoj, profesoroj ktp.);
- c) praktiki siajn lingvojn;
- d) pasigi tempon kune, renkonti malnovajn amikojn kaj/aŭ trovi novajn amikojn aŭ laborpartnerojn.

Jen do, estas multaj kialoj por veni al „Polyglot Gathering“! Ĝojigas la fakto, ke kutime ĉirkaŭ 20 - 25 % da homoj parolas (ankaŭ) Esperanton! Do oni povas tie pasigi

sian tempon tute trankvile ankaŭ uzante nian verdan lingvon.

Ĉi-jare ankaŭ okazis pluraj prelegoj aŭ pri aŭ en Esperanto, oni povis viziti Aligatorejon, Gufujon, kulinaran festivalon ktp. Eĉ la plej juna preleganto estis esperantisto: la 14-jaraĝa Petro Fedosov el Moskvo. Same (jam la sesan fojon) okazis t. n. „Lingva defio“ (Language challenge) - ĉi-jare pri du malsamaj lingvoj: la hinda kaj Esperanto. (Oni devas eklerni la lingvon sesdek tagojn antaŭ la aranĝo kaj dum la evento oni faras teston, kie oni pritaksas la nivelon de la lernintoj).

„Polyglot Gathering“ havas por ni esperantistoj ege interesan historion - eĉ se ankoraŭ mallongan. Kun la ideo venis esperantistoj Chuck Smith kaj Judith Meyer en Berlino en 2014, kiam simila evento (Polyglot Conference) devis okazi en Usono, kaj oni ne volis atendi ĝis 2015, kiam ĝi eble revenus al Eŭropo. Oni do decidis okazigi en Berlino novan poliglotaĵan eventon kaj titolis ĝin „Polyglot Gathering“. La unuaj tri renkontiĝoj okazis en la ĉefurbo de Germanio.

Sed pro kio ĝuste tiu ĉi evento iĝis tiom alloga kaj ŝatata de la komunumo de plurlingvuloj? Eble tio estas granda merito de la tuta koncepto, kiun Chuck kun Judith prenis rekte de la Esperanto-eventoj kaj agordis ĝin por la plurlingvula

grupo. Ili sukcese transprenis plurajn sukcesajn aferojn de Esperanto-aranĝoj kaj enprogramigis ilin al tiu ĉi evento. Evidentiĝis, ke tio estis ĝusta decido! Tiel oni dum Polyglot Gathering povas trovi Gufujon, Aligatorejon, Interkonan vesperon, Kulinaran festivalon, plurlingvan koncerton de JoMo aŭ de aliaj esperantistoj ktp. Jen do, pruvo, ke nia Esperanto-mondeto povas esti alloga ankaŭ por la cetera mondo!

Ekde 2017 la renkontiĝon ĉeforganizas E@I, kiu uzas en sia oficejo Esperanton kiel laborlingvon. Plua videbleco (kaj aŭdebleco) de Esperanto dum la aranĝo do estas garantiita. Krome ni devas alte taksi la rolon de la Esperanto-organizoj, pretaj subteni la aranĝon. Ĉi-jare UEA denove estis subtenanto (sponsoro) de la Plurlingvula Kunveno kaj tiel grave helpas videbligi Esperanton en ĝi.

Kio pri la estonteco? La aranĝo ja havas evidente kreskantan potencialon. kaj ni, kiel organizantoj, emus utiligi tion. Venontjare ĝi okazos la 26-an - 30-an de majo en Teresin, proksime de Varsovio. Ĝi okazos sub unu tegmento, laŭ la stilo de ordinaraj Esperanto-renkontiĝoj oni kongresumos kaj tranoktos en la sama konstruaĵo (tio tamen validos nur por unuaj 300 aliĝintoj, por la sekvaj ĉ. 400 estas aranĝitaj plurnivelaj hoteloj).

La renkontiĝo eble komencos „vagadi“ tra la mondo (aŭ almenaŭ Eŭropo) kaj baldaŭ povos iĝi iaspeca „Universala Kongreso de Poliglotoj“. La potencialo estas, emo organizi ĝin same - do espereble ĝis revido kun vi, kara (plurlingvema) leganto, dum iu el la sekvaj Plurlingvemulaj kunvenoj!

Pli da informoj (angle):
www.polyglotbratislava.com

Ĉi tiu artikolo aperis en la julia numero de *La Ondo de Esperanto* (2019).

Papere: La Ondo de Esperanto, 2019, №7.

Rete: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2019/07/slovakio-27>

Peter Baláž (Petro)

E@I-kunordiganto, PG-organizanto



ESPERANTA RENKONTIĜO SUR ĈANTORYJA EN 2019

En Sileziaj Beskidoj troviĝas montaro Ĉantoryja (995 m.s.m.). Por esperantistoj Ĉantoryja estas loko, kie en la jaro 1926 la unuan fojon renkontiĝis samideanoj el Pollando, Ĉeĥio kaj Slovakio kaj fondis longjaran tradicion rompitan

nur dum la dua mondmilito. Dum la lasta Poludnica, prezidanto de polaj esperantistoj A. Zdechlík notis, ke pasintjare slovakoj ne partoprenis supreniron sur Ĉantoryja. Sekve, LEK anoncis anticipe la daton de la

aranĝo ligitan kun vizito de la pola urbo Zabrze.

URBO ZABRZE

Sabaton, la 15-a de junio 2019, ni veturis per aŭto al Zabrze. Tie vivas 175 mil loĝantoj, urbo havas multajn historiajn konstruaĵojn, interesajn preĝejojn, laboristajn koloniojn kaj konstruaĵojn ligitajn kun minado. Tie ni atendis A. Zdechlík. Post loĝado kaj bona tagmanĝo ni renkontiĝis kun ĉeĥa grupo gvidita de J. Suchánek. Nia grupo vizitis la eksminejojn, nuntempe karbogalerio en muzea karbominejo Guido.



Dissendilo Gliwice

Post mallonga ripozo ni vizitis faman dissendilon apud Gliwice. La germana provoko en Gliwice efektive kaŭzis la eksplodon de la Dua Mondmilito. La 31-an de aŭgusto 1938, SS-taĉmento atakis konstruaĵon de radio-elsendado. Germanaj atakantoj estis vestitaj kiel poloj. Ĉi tiu provoko kaŭzis pretekston por ataki Pollandon, kio

komenciĝis kelkajn horojn poste. La dissendilo Gliwice eniris al la mondhistorio. La 111 metrojn alta turo konstruita el lariko ankoraŭ staras. Vizito de la grava loko por historio estas neforgesebla. Mi dankas pro aranĝado de tiu ĉi vizito al A. Zdechlík kaj J. Vajs. Sen ili mi neniam vizitus tiun lokon ligitan kun sorto de mia propra familio. Ĉar mia patro, kiel pola civitano, tuj post tiu ĉi provoko batalis kontraŭ germanoj kaj falis en kaptitecon.

SUPRENIRO SUR ĈANTORYJA

Dimanĉon matene, la 16-an de junio, ni forveturis aŭtomobile al la banloka urbeto Ustroń. Ĝi troviĝas sub monto Ĉantoryja de la pola flanko. Venante ni vidis skidescendejon kaj apude telferon. En la stacio ni renkontiĝis kun pola grupo gvidita de A. Wilkus el Krakovo. Ni uzis telferon sur la traceo longa proksimume 1,5 km. Vetero estis agrabla, do ni ĝojis pri belvido al naturo kun kolorriĉa floraro. La telfero alportis nin preskaŭ al la turo. Kelkaj samideanoj supreniris sur altan turon de 29 m kaj ceteraj trinkante ripozis sube. Poste ni daŭrigis por atingi pinton kun ligna kabano. Supreniro estis facila kaj ne longa. Sur vojetoj estis multe da polaj turistoj. Kiam komencis pluvi, ni ĉiuj eniris en kabanon por manĝi kaj trinki. Kabano estis plena de

malsataj esperantistoj kaj aliaj turistoj, kiuj babilis kaj kune pasigis agrablan posttagmezon. Fine ni faris fotografaĵojn.



Sume supreniris en tiu ĉi jaro sur Ĉantoryja kvar slovakoj, kvin ĉeĥoj kaj dek kvar polaj esperantistoj, inter ili unu, kiu supreniris jam 50-foje. Ĉi-jara renkontiĝo estis bela, sukcesa kaj konfirmis kontinuecon de la tradicio. Ni pasigis du tagojn kun amikoj, eksciante novaĵojn el pola historio kaj vidante la parton de pola lando kun modernaj aŭtostradoj, urboj, vilaĝoj kaj bone kultivatataj kampoj.

M. Pilková

NI REMEMORAS

IGOR CHÝRA

En homoj, kiuj lin konis, li postlasis tre fortan impreson. Li mortis la 8-an de majo 2009, do antaŭ dek jaroj. Li vivis en Banská Bystrica kaj laboris kiel programisto. En tiu tempo li jam havis tre fortan rilaton al naturo kaj ŝparado. Li estis tre humila. En sia malgranda urba loĝejo li tute ne hejtadis kaj por prilumigado sufiĉis la strat-lampo.

La ŝanĝo en lia vivo okazis, kiam li partoprenis la tendarojn de la junulara organizo Arbo de vivo kaj li ekkonis grupon de homoj, kiuj savis malnovajn tradiciajn konstruaĵojn. Li tre ŝatis kolekti rubaĵojn en arbaroj. Tio estis lia sorto kaj viv-temo. En la jaro 1994 li fondis Recikladan centron en Pliešovce. Li volis, ke ĉiuj rubaĵoj estu dispecigitaj, utiligitaj aŭ reciklitaj. Li ankaŭ fondis Nutraĵan bankon kaj li havis multajn aliajn ideojn, kiuj celis atingi memsufiĉon de loka komunumo. Li devenis el orienta Slovakio. Laŭ nacieco li estis ruteno. Iam li eĉ diris ion en la rutena lingvo, sed plej ofte li parolis sian gepatran lingvon en kantoj. Li neniam scipovis la anglan, sed en la lastaj jaroj de sia vivo li entuziasmiĝis pri Esperanto. Ankaŭ dum la lastaj semajnoj de sia vivo, kiam li povis nur kuŝi, li tradukadis vikipediajn artikolojn en Esperanton.



Fotis: Juraj Lukáč

POEZIA ANGULO

RANA KONCERTO

Vilaĝeto kiel polmo,
 mi ofte rememoras ĝin,
 en arbara brakumo kaŝas
 silentan revon tien sonĝas.
 Tiame, ŝajnas kvazaŭ ĉitage,
 hundoj bojadis kelkfoje.
 En sunsubiro ranoj ekkantis
 horoj ĉesiĝis kaj paco venis.
 Nokto surflugis en vilaĝon,
 steloj ridetis sur la lando,
 luno arĝentis tutan teron,
 amon alportis refoje majoj.
 Plensufoka nokto kreas,
 sango bolas, amo sprosas,
 aero tremas atendante,
 ranoj ekkvakas laŭte.
 Tutan nokton kvako sonas,
 ĉiu virrano amon vokas,
 koncerto ĉarmis mian landon,
 venis beltempo, venis majoj.

M. Václavjaková



Solka loĝata jam en Granda Moravio

EL LA VIVO DE LEK-ANOJ

RODOS PER SES OKULOJ

La 1-an de junio 2019 en kafejo Pianko okazis vojaĝvespero. La ĉeftemo estis la greka insulo Rodos. La insulon en diversaj tempoj vizitis tri membroj de LEK. Pri siaj travivaĵoj kaj spertoj parolis Eva Lepišová, Miroslava Šavelová kaj

Ján Vajs. E. Lepišová en sia prelego parolis pri geografiaj kaj historiaj faktoj rilataj al insulo, kie sur areo de 1 400 km² loĝas 150 000 homoj. La modelo, kie prelegas tri personoj je sama temo estis tre interesa, ĉar aŭskultantoj

povas kompari unuopajn opiniojn de prelegantoj.



La insulo Rodos estas ne nur libertempa loko, sed grava historia loko el antikva epoko. En la insulo staris unu el la sep mondaj mirindaĵoj - giganta statuo de la suna dio Helios, nomata Koloso de Rodos. Historia centro de la plej grava urbo en la insulo Rodos-Urbo estas Monda Kulturheredaĵo de UNESKO. La prelegoj estis akompanataj per projekciado de lumbildoj.

ESPERANTO-FLAGO SUPER LA MARO DE LIPTOV-REGIONO

Dum la somera solstico la 21-an de junio 2019 membro de LEK, samideano Dušan Pavella, navigadis sian rekonstruitan kajutan velŝipon, kiu portas nomon de lia filino „Ivana“. La velŝipo apartenas al la turisma klaso kaj en kokpito povas esti du personoj kaj en kajuto kvar personoj. Tuta longo de la velŝipo estas ses metrojn kaj la velŝipo veturadis sub la flago de Esperanto. Kelkaj tagoj poste la normala ŝipveturado en iu momento ŝanĝis al savveturado, ĉar

sur la akva surfaco renverŝiĝis alia velŝipo. Novulo, kiu ŝipveturadis je eta dupersona velŝipo, estis sola kaj lia velŝipo restis kuŝi surflanke. Dušan Pavella kun siaj amikoj tuj helpis al la malfeli-ĉa ŝip-isto. Li dankis al siaj savantoj kaj rimarkinte Esperantan fla-gon li demandis, ĉu lia ĉefsavanto estas esperantisto.

Poste li informis, ke lia avo Miloš Droppa estis ankaŭ esperantisto. Do nuntempa



esper-antisto savis nepon de maljuna esperantisto.

LA SUKCESA FINSTUDADO



La prezidanto de LEK Vladko Ŝkuta ĵunie sukcese finstudis en Katolika Universitato en la urbo Ružomberok. Li vizitadis tri jaran studadon de U3A (Universitato de la Tria Aĝo) en fako Historio de

kristana kulturo. La stud-adon komenc-is dek ok per-sonoj kaj finis nur kvin sukcesaj studentoj.

V. Ŝkuta preparis finan skrib-laboron je la temo Biblia epizodo kaj mia vojo al Ararat. En la laboro li parolas pri la arkeo de Noaho kaj altmontara supreniro al la plej alta pinto de Turkujo en la jaro 2008. Krom aliaj li menciis supren-portitan Esperanto-flagon de

slovakaj esperantistoj kaj viziton de Muzeo de Arkeo de Noaho.

En konkludoj V. Ŝkuta skribas pri lingvaj problemoj en orienta Turkujo, kie estas malfacile babili kun hejmanoj. Pro tio li proponas tutmondan komunan lingvon Esperanto.

J. V. Habán

HUMURA ANGULO

☆☆☆

- Jozefo, kial vi malsekigas la muron?
- La doktoro ordonis al mi, ke mi almetu malvarmajn kompresojn sur loko, kie mi frapbatis min...

☆☆☆

- Onklino, per kio vi nutras vian hundon, mi petas vin... – demandas Zuzana.
- Kaj kial interesas vin tio, knabineto, ĉu vi havas ankaŭ hundon?
- Mi petas ne, sed ni volus tiel maldikiĝi.

☆☆☆

La avo suprengrimpis sur pomarbo kaj volis skufaligi pomojn. Sed sub la arbo staris nepino, la avo krias: „Zuzanjo, foriru desub arbo, ĉar ili falos sur vin.“ Ŝi foriris kaj krias: „Avo, mi jam foriris, vi povas jam fali.“

☆☆☆

Ĉiuj lingvoj estus multe pli facilaj, se ne ekzistus poetoj.

(Raymond Schwartz: Kun siaspeca spico)

☆☆☆

Ankaŭ en tio montriĝis la genio de Zamenhof, ke kvarcentpaĝajn gramatikojn li sciis resumi en dek ses paragraftoj.

(Raymond Schwartz: Kun siaspeca spico)

☆☆☆

LA 71-A INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO (LA 3-AN - LA 9-AN DE MAJO 2019)

En Andaluzio en la urbo Malago situanta ĉe la Marbordo de Suno okazis ĉe tri kongres-aranĝoj komence de majo. La 78-a Hispana Kongreso, la 21-a Andaluzia Kongreso kaj la 71-a IFEF-Kongreso. La eventojn partoprenis ĉirkaŭ 180 geesperantistoj el 22 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Brazilo, Ĉinio, Japanio, Koreio, Meksiko. Regis tre agrabla internacia etoso.

La unua IFEF-kongreso en Hispanio okazis en Barcelono en la jaro 1909. La ĉefa kialo elekti Hispanion kiel kongreslandon estis deziro festi tie la 110-an jubileon. Al tio forte strebis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. Ŝi sukcesis konvinki esperantistojn en Malago, ke ili organizu la kongreson en sia lando. La elekto estis bona; agrabla ĉemara urbo, bela suna vetero, konvena kongresejo en Dioceza Domo, kie ĉio okazis sub la sama tegmento.

La programo estis varia kaj riĉa je diversaj prelegoj, atelieroj, ekskursoj kaj artaj vesperaj programeroj. La inaŭguro okazis en granda salono kun partopreno de la reprezentantoj de ĉiuj asocioj. HEF (Hispana Esperanto-Federacio) estis reprezentata de Tonyo del Barrio, AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) de Ángel Arguillos kaj IFEF de Rodica Todor. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de UEA kaj la urba skabenino pri kulturo. Post bonvenigaj vortoj kaj salutoj de reprezentantoj de la partoprenantaj landoj, la kongreso estis malfermita. Poste okazis komuna fotado.

Inter la partoprenantoj ĉeestis eminentaj personoj: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de L. L. Zamenhof, Seán Ó Riain, irlanda diplomato en Vieno, Katalin Kováts, fakulino pri lingvistiko kaj Esperanto-instruado, Federico Gobbo, doktoro pri informadiko kaj komunikado kaj du estraranoj de UEA - por nomi nur kelkajn.

Okazis ĝeneralaj, fakaj, komitataj kaj estrar-kunsidoj, estis priparolataj movadaj aferoj kaj strategio pri la estonteco de IFEF. Estis elektita nova estraro por tri-jara periodo. Interesis nin prelegoj rilataj al fervojo: „La AVE (hispana grandrapida trajno) al Mekko“, „Hyperloop“ (morgaŭa fervojo), „Veturado tra la interplaneda spaco“, „110-a jariĝo de la internacia fervojista movado“. Surpriza estis sciigo pri la projekto de Esperanto-stacio en forlasita stacidomo Halbe ĉe Berlino. Estis prezentataj venontjaraj kongres-lokoj. IFEF kongresos en Germanio en Frankfurt an

der Oder kaj en pola urbo Ślubice situanta trans ponto ĉe la germana limo. Samtempe okazos la germana kaj la pola kongresoj.

Interesaj estis debatoj kaj prelegoj pri diversaj temoj, inter kiuj: „La angla lingvo en la Eŭropa Unio post la Briteliro“, „Projekto Erasmus“, „Kiujn fremdlingvojn oni instruas en EU?“, „La homo sur la Luno“, „Ĉu EU vere havas 24 oficialajn lingvojn?“, „Enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon ĉe EU“. Esperantan Katedron en la Amsterdama Universitato prezentis Federico Gobbo, pri la projekto „Esperanto plaĝo“ en hispana ĉemara urbo Cullera parolis Dennis Keefe.

Krome okazis ateliero pri informadiko, pri arĥivado kaj pri mikro-rakontoj. Eblis partopreni Esperanto-kursojn kaj KER-ekzamenojn. Pri la libroservo zorgis Mariló Torres kaj Conchi Fernández. Pri aŭkcio okupiĝis Tonyo del Barrio, Katalin Kováts kaj Margareta Zaleski-Zamenhof. Vendiĝis ĉiuj proponataj objektoj por la profito de la kongreso. En la loka ĵurnalo „La Opinión de Málaga“ aperis ampleksa artikolo kun fotoj pri la kongreso kaj pri Esperanto.

Tuttagaj ekskursoj gvidis nin al urboj Rondo, Granado, Kordovo kaj Madinat al-Zahra. Duontaga ekskurso celis la urbon Antequera. Plaĉa estis faka ekskurso al fervojlinio en Zafarraya, kie ni ĝuis veturon en trajneto tirata per eta vaporlokomotivo. Ne mankis urbovizitado al Malago kaj al ĝia bela botanika ĝardeno.

Dum la semajno okazis abunda, tre varia kaj altkvalita muzika kaj arta programo. Vesperan programeron „Vivu la teatro“ reĝisoris Miguel Fernández kaj Ana Manero. Andaluzian muzikon ni ĝuis kun Rocío Alba, Pedro Carrillo kaj Concerto Málaga. Per Esperanto-muziko kaj kanzonoj regalis nin Grazia Barboni, Kajto kaj per ciganaj kantoj Saša Pilipović. Li ankaŭ impone kaj profesie prezentis monodramon pri Galileo. Ĉe la fermo estis transdonita la IFEF-flago al la reprezentantoj de Germanio, kie okazos la transponta Esperanto-kongreso: germana, pola kaj fervojista de la 29-a de majo ĝis la 5-a de junio 2020. Vi estas invititaj partopreni ĝin.

En ĉi-kongreso ni ĝuis emociplenajn momentojn, internacian kaj amikeman etoson. Koran dankon al niaj andaluziaj samideanoj kaj al iliaj kunhelpantoj pro agrabla semajno en Malago!

Ege interesa estis la tritaga postkongresa ekskurso al norda Maroko, kiun ĝuis kvardek tri gesamideanoj. Ni traveturis la urbon Ceuta kaj vizitis la urbojn Tetouan, Asilah, Tanger kaj Chaouen.



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda